# *Kubo kaj Francio: oficiala vizito de Raúl Castro.*



La kuba prezidento Raúl Castro alvenis al Parizo por plenumi oficialan viziton invitite de la prezidento Francois Hollande.

La kuba ?tatestro alvenis al la franca ?efurbo kun delegitaro formita de la vicprezidanto de la ministra konsilantaro, Ricardo Cabrisas, la ministro pri eksteraj rilatoj, Bruno Rodrígez Parrilla kaj la ministro pri ekstera komerco kaj fremdaj investoj, Rodrigo Malmierca Díaz.

Anka? membras en la kuba delegitaro, la vicministro pri eksteraj rilatoj, Rogelio Sierra Cruz kaj la ambasadoro de Kubo en Francio, Héctor Igarza Cabrera.

Tiu ?i vizito celas plifortigi la reciprokajn rilatojn kaj markos novan impulson en la rilatoj inter la du landoj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/82742-kubo-kaj-francio-oficiala-vizito-de-raul-castro

# Radio Habana Cuba